# KRIZA MOMENTO : KIU PLU VIVIGOS KVINPETALON ? ĈU VI ?

La komitato de **SYM-Kvinpetalo** konstatas ke ni devas urĝe ŝanĝi la ekonomian modelon. Tiu modifo de ekonomia modelo estas konsekvenco de alia modifo.

**Antaŭe, la ĉefa ekonomia fonto de la asocio estis la staĝoj**. Sed tio ne plu validas, ĉar nur malmultaj partoprenas kaj ankaŭ staĝoj estis nuligitaj pro manko de homoj. Dankegon tamen al la fidelaj partoprenintoj. Ni devas konstati, ne nur ĉe ni, ke la partopreno malpliiĝas. Ni devas kompreni kial. Ĉu la **datoj** ne estas konvenaj ? Ĉu la **temoj** ne estas konvenaj ? Ĉu la **formo** ne estas konvena ? Ĉu simple la kutimo perdiĝis ? Aŭ ĉu la kutima publiko simple maljuniĝis ?

La nuna ĉefa celo de la asocio estas **konservi, diskonigi, disponigi kaj vivigi la esperantan kulturon**, tra biblioteko (pli ol 8000 libroj kaj broŝuroj, ankaŭ multaj revuoj), arkivoj kaj daŭre staĝoj, ktp. Gravas ankaŭ ke nia dokumentaro estu je dispono de studentoj, esploristoj, verkistoj.

Fakte **jam de kelkaj jaroj, la asocio supervivis dank' al kelkaj donacantoj**. Tiu modelo povas bone funkcii nur se ni sukcesas konvinki pli da donacantoj. Ju pli da subtenantoj, des pli da donacoj. Ĉiun jaron ni bezonas por funkciigi la domojn proksimume 12 000 € (impostoj, elektro, akvo, asekuro, k.c.). Tiu cifero ŝajne imponas. Tamen, **se 100 donacantoj donacus nur po 120 € jare**, tio sufiĉus. **Jam tuj** por ĉi tiu jaro estas bezono.

Se vi pensas ke la celo de la centro Kvinpetalo estas grava por vi, eble pro la rememoroj, sed precipe por la estonteco, **ĉu vi pretas helpi ?** Se vi pensas ke tio, kio estis grava al vi en via vivo devas pluvivi, vi havas tie la eblecon helpi. **Se vi ne volas**, ke la Esperanto-movado simple malaperu, ke oni forgesu ĝin, vi povas tiel helpi. Se vi volas ke tiu homara idealo pluvivu, vi povas helpi.

**Ni bezonas scii kiom da homoj pretas subteni tiun celon**, kaj je kiu nivelo. Ni ankaŭ bezonas scii kiu ne plu interesiĝas en la afero pro iu ajn kialo.
Vi povas ankaŭ alparoli aliajn esperantistojn, por indiki al ili tiun eblecon helpi pri afero kiu koncernas ankaŭ ilin.
Vi povas krome sugesti ankaŭ al ne-esperantistoj subteni tiun kulturan agadon pri homara heredaĵo.

Ankaŭ same daŭre, **partopreno en staĝoj** (kaj/aŭ varbado por ili) helpas grande la asocion kaj la centron.

Ni do esperas kaj atendas vian respondon.

*La komitato de la asocio SYM (Société Yvonne Martinot) kiu zorgas pri la centro Kvinpetalo. Oktobro 2024.*

Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, 86410 Bouresse. **http://kvinpetalo.org**
Ĉekoj al Société Yvonne Martinot
Société Yvonne Martinot, IBAN : FR91 2004 1010 0602 4086 2H02 795, BIC : PSSTFRPPLIM

--------------------------------------------------------------------------------

*Respondilo por sendi poŝte (aŭ rete al* kasisto.kvinpetalo@sfr.fr*)*

Nomo :
Retadreso :

[] Mi estas preta donaci **jare** 50€ / 120€ / 250€ / 500€ / 1000€ / ..............€.
[] Mi ĵus sendis .................€ al via konto la (daton)............................. 2024 ([] ĝiro, [] ĉeko)

[] Mi ne povas helpi per donaco sed mi proponas alian subtenon
(bv klarigi) : .................................................................

[] Mi ne povas helpi la asocion sed mi deziras daŭre ricevi novaĵleteron.

[] Mi deziras ne plu ricevi informojn : bonvolu eltiri mian adreson el via listo.

Sugestoj, ekzemple pri la staĝoj : ......................................................

# MOMENT DE CRISE : QUI SOUTIENDRA KVINPETALO ? VOUS ?

Le comité de **SYM-Kvinpetalo** constate qu'il est urgent de changer de modèle économique. Cette modification du modèle économique est la conséquence d'une autre modification.

**Auparavant, la principale source économique de l'association était les stages**. Mais cela n'est plus valable, car seuls quelques-uns y participent et de même des stages ont été annulés faute de monde. Un grand merci néanmoins aux fidèles participants. Nous devons constater, et pas seulement chez nous, que la participation diminue. Nous devons comprendre pourquoi. **Les dates** ne conviennent-elles pas ? **Les sujets** ne sont-ils pas adaptés ? **La forme** n'est-elle pas adaptée ? L'habitude est-elle simplement perdue ? Ou le public habituel a-t-il simplement vieilli ?
Le but principal actuel de l'association est de **préserver, faire connaître, rendre disponible et faire vivre la culture espérantiste**, à travers une bibliothèque (plus de 8000 livres et brochures, nombreuses revues), des archives et des stages, etc. Il est également important que notre documentation soit accessible aux étudiants, chercheurs, écrivains.

En fait, **depuis plusieurs années, l'association survit grâce à quelques donateurs**. Ce modèle ne peut bien fonctionner que si nous parvenons à convaincre davantage de donateurs. Plus il y a de donateurs, plus il y a de dons. Chaque année, nous avons besoin d'environ 12 000 € pour faire fonctionner les maisons (taxes, électricité, eau, assurance, etc.). Ce chiffre paraît impressionnant. Mais si **100 donateurs donnaient seulement 120 € par an**, cela suffirait. **Il y a déjà un besoin pour cette année**.

Si vous pensez que le but du centre Kvinpetalo est important pour vous, peut-être à cause des souvenirs, mais surtout pour l'avenir, **êtes-vous prêt à aider ?**
Si vous pensez que ce qui était important pour vous dans votre vie doit survivre, vous avez la possibilité d'aider.
**Si vous ne voulez pas** que le mouvement espérantiste disparaisse tout simplement, soit oublié, vous pouvez nous aider ainsi. Si vous voulez que cet idéal humain survive, vous pouvez aider.

**Nous devons savoir combien de personnes sont prêtes à soutenir ce but**, et à quel niveau. Nous devons également savoir qui, pour une raison ou pour une autre, ne s'intéresse plus à cette question.
Vous pouvez aussi vous adresser à d'autres espérantistes, pour leur indiquer la possibilité de contribuer à une chose qui les concerne tout autant.
Vous pouvez également proposer aux non-espérantistes de soutenir cette activité culturelle du patrimoine humain.

De plus, **la participation à des stages** (et/ou l'information sur ceux-ci) aide grandement l'association et le centre.

Nous espérons donc et attendons votre réponse

*Le Comité de l'association SYM (Société Yvonne Martinot) qui gère le centre Kvinpetalo. Octobre 2024.*

Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, 86410 Bouresse. **http://kvinpetalo.org**
Chèques à Société Yvonne Martinot
Société Yvonne Martinot, IBAN : FR91 2004 1010 0602 4086 2H02 795, BIC : PSSTFRPPLIM

---

*Coupon-réponse à envoyer par la poste (ou par courriel à* kasisto.kvinpetalo@sfr.fr*)*

Nom :
Adresse électronique :

[] Je suis prêt à donner **par an** 50€ / 120€ / 250€ / 500€ / 1000€ / ..............€.
[] Je viens d'envoyer .................€ à votre compte le (date)............................. 2024 ([] virement, [] chèque)

[] Je ne peux pas aider par un don, mais je propose un autre soutien
(précisez) : ...................................................................

[] Je ne peux pas aider l'association mais je désire continuer à recevoir les lettres de nouvelles.

[] Je ne souhaite plus recevoir d'informations : veuillez retirer mon adresse de votre liste.

Suggestions, par exemple sur les stages : ......................................................